

Aŭstraliaj Esperantistoj

Novajletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale

PLENUMITA 27/08/2020 Kvarcentnaŭdektria eldono (unua eldono 20/09/2011)



Subtenu vian Novajleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

Uzindaj ligoj [reta-vortaro](#) [Freelang Vortaro](#) [Plena Ilustrita Vortaro](#) [Duolingo](#)

[Google Translate](#) [Pasintaj AE eldonoj](#) [duolingo entute](#) [lingvohelpilo](#)

[Esperanta Retradio](#) [Esperanta himno](#) [PMEGramatiko](#) [openclipart](#)

Oni povas meti sian nomon, retadreson, urbon kaj landon al la listo de ricevantoj. rspring@tpg.com.au



Entute **721,600** lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo



Nun studas **282,000** lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)

Nun studas **227,000** lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)

Nun studas **211,000** lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018)


Nun studas **11,600** lernantoj per la franca lingvo. (Ekde julio 2020)

Nun preparas Esperantan programon por ĉinoj. (Ekde oktobro 2020 ?)



(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917)

Gramatika serio “La Verbo en P.A.G.” N.ro. 135



KOMUNIKO AL LA LEGANTOJ .

La serio “La Verbo en P.A.G” estas preskaŭ finita. Restas nur cento da paĝoj, ne tre gravaj por perfektigi en la gramatiko de la lingvo. Ĉar miaj maljunaj okuloj ne plu kapablas legi librojn, kaj ĉar por ekzameni la enhavon de libro necesas legi ĝin, **mi hodiaŭ ĉesas la rubrikon “La Verbo en P.A.G.”.**

Anstataŭe mi komencas rubrikon “Por Komencantoj”, en kiu mi komentos Esperanto-kurson per simplaj ekstraj informaĵoj kiujn normale kursgvidanto ne donas, ĉar ne bezonas doni, sed kiuj tamen povos interesi la lernantojn. Mi uzos por tio la lernolibreton “*The Esperanto-Teacher*” (per Mason Stuttard), por havi gvidon pri la temoj instruataj. En miaj komentoj mi ne intencas kritiki aŭ ŝanĝi tion, kion instruas la libreto. . *Ekzemple mi povus menci, ke Zamenhof ŝanĝis sian Fundamentan vorton “elrigardi” al “aspekti”, ĉar elrigardi estas la litera traduko de la germana “aussehen”, kiu signifas “aspekti” dum “elrigardi” signifas ke oni estas en kovrita loko kaj rigardas eksteren.*

Marcel Leereveld.



Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE

Surhavu vizaĝmaskon.

Unu terno povas elŝpruci ĝis 8 metroj.

<https://twitter.com/i/status/1245591199034929153>

Roger Springer

Protekilo por la portanto sed ankaŭ por la proksimuloj



Estrarkunveno

La lasta estrarkunveno okazis la 20an de aŭgusto . La venonta okazos ĵaŭdon , la 3an de septembro



Aŭstralio Ĉinujo Usono

Estontaj problemoj por Aŭstralio

La perdo de ĉina mono kontraŭos la bonstaton de Aŭstraliaj civitanoj

Ĉu la agoj de la parlamento estas konvenaj en la nuna mondsituacio?

Roger Springer



Eltiraĵoj el la retejo *Greenvillepost* pri Aŭstralio. (ne la kutima fonto de novaĵo en Aŭstralio) .

<https://www.greenvillepost.com/2020/08/11/australia-the-working-of-the-american-imperial-hand-2/>

“Aŭstralio nuntempe luktas pri sia nun-kronika dilemo: kiel ekvilibrigi siajn rilatojn kun la obstina kaj nefidinda Ameriko de Trump, kaj ĉiam pli kolera komerca partnero Ĉinujo.”

“Sur la politika nivelo, Morrison kaj liaj ministroj ĉiutage fosas pli profunde la truon en kiu ili estas, tro fieraj por pardonpeti al Ĉinio pro sia agresema mallerteco.”

“La usoninklina aŭstralia politika-strategia elito daŭre agos kontraŭe al la propra intereso de Aŭstralio.”



Grandega imperia defenda armeo.

Bezonas malamikojn, profitojn Jen la monda problemo. Roger Springer



Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE

(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917)

Via parolantado estas muziko en miaj oreloj.

PLI DA GRAMATIKAJ SEKRETOJ .



Ni faru pli da spionado. En la ĉina kaj en la vjetnama kaj en kelkaj aliaj neeŭropaj lingvoj oni parolas la vortojn en tri aŭ kvin malsamaj tonoj, tiel ke unu vorto reprezentas tri aŭ kvin malsamajn signifojn. La rezulto estas, ke oni en tiuj lingvoj bezonas havi nur trionon de la vortoj ol en eŭropaj lingvoj. Vi jam sciis tion, antaŭ ol mi menciis tion. Dum eŭropanoj parolas pli-malpli monotone, la ĉinoj kaj la vjetnamanoj devas regule ŝanĝi la tonojn en unu frazo. Kelkfoje eĉ unu vorto sisekve aperas, kun du malsamaj signifoj pro la malsamaj tonoj. Cetere la vortoj en tiuj lingvoj estas tre mallongaj, nur du- aŭ triliteraj. **Ili do parolas pli rapide ol eŭropanoj**, kiuj bezonas ofte pli longajn vortojn. Tamen la signifoj en tiuj aziaj lingvoj ankaŭ ofte dependas de la antaŭa aŭ de la posta vortoj.

En Eŭropo oni havas tamen iom da tonŝanĝo, kaj nur por montri komencon kaj finon de frazo, aŭ en alia kazo, ekzemple ĉe demando. Tiuj tonŝanĝoj ne ŝanĝas la signifon de la radikoj de la vortoj, nur la ekstrajn signiferojn pro la funkcio en la frazo. Eŭropaj lingvoj ofte havas ankaŭ sian specialan tonon por tutaj frazoj. Ekzemple en la franca la frazo ne povas finiĝi per senakcenta klarvokala silabo. La sveda disvolvis sian specialan, kvankam senvaloran, tonalternivadon, kvazaŭ ili iomete kantas sian lingvon.

Sed ĉu vi sciis ke, preskaŭ sekrete, kelkaj eŭropaj lingvoj, speciale la angla, ŝanĝas la tonon de siaj adjektivoj por ŝanĝi parton de siaj signifoj? Ĉiuj angloj faras tion, kvankam kutime nekonscie. Do ankaŭ la angloj uzas tonŝanĝon por ŝanĝi signifojn, sed ne tiom konsekvence kiom la ĉinoj. En la skribata lingvo la eŭropaj lingvoj ne kapablas montri la tonŝanĝojn, dum en la ĉina oni povas, kaj ofte faras, kaj en la vjetnama oni ĉiam montras la tonon en la skribata lingvo (inventita por ili de franca lingvisto).



La eŭropa signifoŝanĝo per tono okazas ĉe la adjektivoj rilate al siaj substantivoj. En la sekvaj ekzemploj la substrekita vokalo signifas, ke ĝi havas en la parolo pli da emfazo kaj sekve iom pli altan tonon.

Vi imagu, ke vi havas nur unu fraton, kaj li estas pli maljuna ol vi. Kiam vi mencias lin, vi diras AŬ “my brother”, AŬ “my older brother”, kaj la emfazo estas ne sur “older”, sed sur “brother”, ĉar sen emfazi ke li estas *older*, li tamen estas kaj estas la nura mia frato. Sed nun imagu, ke vi havas du fratojn kaj ke unu estas pli juna kaj la alia pli maljuna ol vi. Nun vi devas distingi inter la du fratoj, donante pli da emfazo sur “pli maljuna” (aŭ sur “pli juna”), jene “My older brother”, por distingi lin de via pli juna frato, “my younger brother”. Kaj en “Look, that is my older sister”, kie mi havas nur unu fratinojn, kaj “Look, that is my older sister”, kie mi havas ankaŭ pli junan fratinojn. Kiam vi parolas, vi eĉ ne rimarkas ke vi altigas la tonon: vi faras tion aŭtomate. Kaj ĉiuj ĝermanlingvanoj faras la samon en siaj lingvoj.

Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE

En la skribata lingvo tio ne montriĝas, kaj tie vi do devas diveni el la kunteksto. Escepte ke la angla lingvo havas diversigan rimedon por montri la diferencon skribe, sed nur tiam kiam la vorto aperas en rilata subfrazo, kiel jene:

Mi havas nur unu fraton: "Mi telefonos al mia frato (*brother*), kiu estas pli maljuna"; kaj Mi havas pli maljunan kaj pli junan fratojn: "Mi telefonos al mia frato (*brother*) kiu estas pli maljuna"

Notu ke en la unua frazo troviĝas komo antaŭ la rilata subfrazo, dum en la dua frazo tiu komo mankas. Tio por la angloj signifas, ke en la unua frazo la voĉo malaltiĝas, ĉar la subfrazo ne bezoniĝas por klarigi ke mi havas nur unu fraton, dum en la dua frazo la manko de komo signifas ke la subfrazo estas esenca por indiki ke mi havas ankaŭ pli junan fraton. Pro tio en lingvismo oni diras, ke en la unua frazo la adjektivo ("pli maljuna") estas "aldona", ĉar ne bezonata, dum en la dua frazo la adjektivo ("pli maljuna") estas "elekta", ĉar bezonata por elekti el du aŭ pli da ebloj. Tiuj titoloj, "Elekta" kaj "Aldona", aplikiĝas al ĉiuj adjektivoj, sed kutime la adjektivo estas Aldona ĉe la substantivo. Do ĝi estas Aldona en "Li perdis sian filon, Petron" kaj ĝi estas Elekta en "Li perdis sian filon Petro". Alia ekzemplo: "Ci havas belan ĉapelon" (Elekta), kaj "Ankaŭ mi aĉetu tian belan ĉapelon" (Aldona). Alia: "Adelajdo estas bela urbo"; "Mi ofte vizitis tiun belan urbon". Alia: "Ĉu ci konas la francan urbon Vjeno?"; "Mi vizitis tiun francan urbon". **Marcel Leereveld.**

LibreOffice 7.0

LibreOffice 7.0 alvenis. Ĝi havas multajn novajn funkciojn kaj plibonigojn. The Document Foundation, kiu gvidas la evoluigadon de la programaro, diras ke LibreOffice estas "nova, grava eldono kun signifaj novaj funkcioj". Ili prezentas la novan eldonon ĉe:

<https://www.omgubuntu.co.uk/2020/08/libreoffice-7-0-released-this-is-whats-new>

LibreOffice estas libera programaro, kaj vi povas akiri ĝin senpage. Se vi volas nun elŝuti ĝin por via Vindoza, Makintoŝa aŭ Linuksa komputilo, iru al la retpaĝo **eo.libreoffice.org**. Por instali ĝin kun la ebleco de esperanta fasado kaj helpo, elektu la esperantajn dosierojn.

La plej grava avantaĝo de LibreOffice por esperantistoj estas ke ĝi povas utiligi literumkontrolilon por esperantaj tekstoj. Tio estas grava ĉar multaj eraroj troviĝas en esperantlingvaj retpaĝoj.

Por plua informo iru al: <https://www.esperanto.org.nz/learn-and-use-esperanto/how-to-type-Esperanto-characters/>

Donald Rogers



Se vi ne laboras, vi ne manĝas.

La homaro ne plu bezonas tiun ideon.

Tre baldaŭ multajn mondloĝantoj mortmalsatos ĉar milionaj homoj ne havas laboron.



Universala baza enspezo (UBI)

Por pli kontentiga kaj sekura mondo

Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE

Universala baza enspezo (UBI) estas simpla ideo: perioda konstanta pago senkondiĉe transdonita al ĉiuj individuoj, sen rimedo-testado aŭ labora postulo.

Tio helpas solvi multajn nunajn problemojn de la tuta homaro Roger Springer



La Aŭstraliaj Klubo <http://aea.esperanto.org.au/local-groups/>

Brisbana Esperanto-Societo Petro Danzer Tel: 0402 766 557

Retpoŝto: brisbane@esperanto.org.au

Central Coast and Newcastle Esperanto Club Joanne Cho Tel: 0413 087 340

Retpoŝto: centralcoast@esperanto.org.au

Esperanto Coffee Club of Canberra Huigh Malcolm Tel: (02) 6288 4334

Retpoŝto: canberra@esperanto.org.au

Esperanto Federation of New South Wales Tel: (02) 9319 4775

Retpoŝto: nsw@esperanto.org.au

Esperanto in South Australia Indrani Beharry-Lall Tel: (08) 8285 3128

Retpoŝto: sa@esperanto.org.au

Esperanto League of Western Australia Shayne Power Tel: (08) 9343 9532

Retpoŝto: esperantowa@hotmail.com

Manly Esperanto Club Roger Springer Tel: (02) 9976 6320

Retpoŝto: manly@esperanto.org.au

Melbourne Esperanto Association Heather Heldzingen Tel: (03) 9525 4295

Retpoŝto: melbourne@esperanto.org.au

Tasmanian Esperanto Society Kam Lee Tel: (03) 62251474

Retpoŝto: tas@esperanto.org.au

Torquay Esperanto Coffee Club John Adams Tel: (03) 5261 2899 / 0421 043 272

Retpoŝto: torquay@esperanto.org.au

Tuvumba Esperanto-Societo Hazel Green Tel: (07) 4691 1238

Retpoŝto: toowoomba@esperanto.org.au

Se informon pri via klubo mankas aŭ eraras informu min. Roger Springer rspring@tpg.com.au



3ZZZ

Dank' al la elsendo de la 24a de aŭgusto eblas revivi partojn de la Filipina

Esperanto-Junularo 7 Jara - parolado, muziko, poemoj - kaj de la prelego de Trevor Steele pri pandemioj kaj iliaj sekvoj. La programo celas ankaŭ memori vin pri la fandiĝo de la glacioj pro nia vivmaniero kaj amuzi vin per ĉarma fabelo

Al la membroj, kiuj deziras renovigi sian membrecon al 3ZZZ per la reto, sed ne memoras la numeron de sia membreco, kontaktu min fran 14@bigpond.net.au, mi ĝin donos al vi



Franciska Toubale



Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE